



Enhavo

- AMO 64 V en aktiva preparo
- Temo, tago, lud-reguloj
- Prepara tempo-skemo
- Indika programo - ampleksigebla

Redakcio: Stefan MacGill, Mirejo Grosjean.

EKO 2020-17 sendita el Budapeŝto la 23an de aprilo.

Al: Komitato, sekcioj kaj aktivuloj de ILEI, Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en multaj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj. Pli ol 1500 ricevantoj.

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de ILEI kaj UEA

AMO 64 en aktiva preparo

Post la brila (*ne mia juĝo: SMG*) sukceso kaj kvalito de AMO 63 v, organizita kunlabore kun nia irana Landa Asocio, ni progresas plenergie por starigi la 64-an seminarion (same virtualan), por eluzi la aparte menditan amas-aliron al Zomo, kiun plenumis niaj iranaj kolegoj. Jen informoj pri la sekva seminario:

Temo: **Niaj fakaj asocioj levas sin.**

Dato: sabato la 9an de majo.

Horoj: decidotaj, laŭ la nombro kaj loĝloko de partoprenantoj. Kredeble ekde 15.00h irana tempo.

La teknika bazo: Irano (kies abono ĉe Zomo finiĝas en la 10a de majo).

Kontribuantoj: varbataj laŭ striktaj kondiĉoj:

- 45-minutaj sesioj: maks. 30 min. por prezento, la cetero por demandoj.
- Anticipa livero de la prezentaĵa materialo aŭ minimume resuma teksto.
- Aliro al Zomo.

Proponata programero: Forumo kun reprezentantoj de kunlaborantaj Fakaj Asocioj.

Temposkemo por preparoj (ĉiam ekde):

Aprilo 21: Varbado de kontribuantoj. Minimume 4. (atingita ene de 24 horoj)

Aprilo 22: Foruma varbado de partoprenantoj de UMEA, ILEI (konfirmis), IKEF kaj aliaj.

Aprilo 23: Alvoko al ĉiu Faka Asocio montri vivsignon kaj kunlabori.

Aprilo 24: Anonco de la seminario se eble kun ia programo. (Jen tio).

Aprilo 26: Aktiva varbado de publiko.

Majo 2: Fikso de la longo kaj horoj de la seminario kaj fiksita programo. (okazos pli frue)

Majo 5: Limo por ricevi la materialon de kontribuontoj

Momenta programo – povos ampleksiĝi kaj ŝanĝiĝi. (Ĉio laŭ irana tempo (CEST + 3h 30))

- 15.00h – 15.45h So Ĵin Su (estrarano de UEA): Koreio – ekzemplodona lando.
15.45h – 16.30 Amri Wandel (estrarano de UEA): La nova pandemia retejo de UEA
16.30h- 17.15h Malgosia Komarnicka: Pollando - Regionaj asocioj levas sin al la nuntempo.
17.15 – 18.00h Forumo: UMEA, ILEI, IKEF, eble aliaj Fakaj Asocioj. Gvidos SMG.



So Ĵin Su en Bunda, Tanzanio en 2016, Amri Wandel (ankaŭ 2016, Malgosia Komarnicka el Wroclaw/Lubin, la foto el la arĥivo de la revuo *Juna Amiko*.



Ĉiuj anoncitoj kaj kontribuontoj por AMO 63 (virtuala) ricevos la alirajn informojn por AMO 64 v.

Vortoj: 510

=====

Ĉi tiu komunikilo estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>>.

Aperintaj komunikiloj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: <http://aktivulo.net/eo/content/komunikiloj-pri-agado>. La prezento estas ĝisdata ĝis 2019/15. Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro.

ALDONU VIN: Skribu al <stefan.macgill@>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

SUBTRAHU VIN: Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolitoj.